John Howard Payne,

# Hejmo, dolĉa nom'

*tradukita de Adela Schafer*

Riĉecon senliman oferus ni
pro l'kara hejmvivo kaj hejma simpati'.
La hejmon sanktigas ĉiela benad',
sentata nenie en fremda vivad'.
Hejmo, dolĉa nom' -
benata ĉiele, ho kara patra dom'.

Nenio allogas en teda malproksim',
pro l'hejmo, eĉ simla, sopiras la anim',
pro kanto de l'birdoj en kara hejmĝarden'
jen amon ni ĝuas en plej ŝatata ben'.
Hejmo, dolĉa nom' -
benata ĉiele, ho kara patra dom'.

.........................................
.........................................
.........................................
.........................................
..........................
.........................................

.........................................
.........................................
.........................................
.........................................
..........................
.........................................

. . .

.........................................
.........................................
.........................................
.........................................
..........................
.........................................

*Traduko de la Angla poemo "Home. sweet home" de* John Howard Payne *(∗1791-06-09 – †1852-04-10) en Esperanton de* Adela Schafer *(plumnomo: Ad. Ŝefer, ∗1865-02-11).*

*Arg-1008-2043 (2014-05-18 11:06:27)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Pri la tradukintino vidu la retejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Louisa_Frederica_Adela_Schafer.